

petas ke vi bonvolu akcepti ĉi tiun elegantan fingroingon.” Ĉe la fino de tiu mallonga parolo ĉiuj aplaudis.

Alicio pensis interne ke la tuta afero estas absurda, sed ĉiuj tenadis sin tiel serioze ke ŝi ne kuraĝis ridi. Ankaŭ ĉar ŝi ne povis elpensi ion dirindan, ŝi nur simple klinis respekte la kapon akceptante la ingon, kaj tenadis sin kiel eble plej serioze.

Kaj nun sekvis la manĝado de la sukeraĵoj. Tio kaŭzis ne malmulte da bruo kaj konfuzo. Grandaj birdoj plendis ke ili ne povas gustumi siajn ; malgrandaj aliflanke sufokiĝis, kaj estis necese kuraci ilin per la dorsfrapada kuraco. Tamen ĉio fine elfariĝis. Ili sidigis sin denove en la rondo kaj petis al la Muso ke ĝi rakontu al ili ion plu.

“Vi ja promesis rakonti al mi vian historion” diris Alicio “kaj la kaŭzon pro kiu vi malamas la... la... la... Ko kaj Ho.” Tiujn komencajn literojn ŝi aldonis per tre mallaŭta flustro, ektimante ke ĝi ree ofendiĝos.

“Mia teĵlo”¹ diris la Muso “estas tre longa kaj tre malĝoja.”

“Mi vidas ke ĝi estas longa” diris Alicio rigardante kun miro ĝian voston, “sed kial vi ĝin nomas malĝoja?” Kaj dum la daŭro de la

¹Vidu noton sur paĝo 20.